

La Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-740/117, 1983 novembro 10, 12

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-117/SRI-117-2-740-1983-nov-10-12-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-Kultura-Centro-Esperantista-en-La-Chaux-de-Fonds.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum tiu ĉi somero venis vizitantoj en La Chaux-de-Fonds, kiuj konatiĝis kun nia esperanto-aktiveco antaŭ ĉio tra la kanalo de nia Svisa Radio Internacia. Ĉiuj esprimis la deziron, ke ni iom detale raportu pri la nuna disvolviĝo de KCE, tio estas de Kultura Centro Esperantista kaj ankaŭ de CDELI, tio estas Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia. Ili opiniis, ke tro malmulte da vizitantoj komprenas la realan signifon de la laboro. kiu efektiviĝas en La Chaux-de-Fonds, kaj tiuj kiuj ne venis surloke, ne imagas eĉ, kio estas KCE kaj CDELI. Mi promesis al ili raporti pri tiu aktiveco, kiu tutcerte indas je diskoniĝo. Kaj mi esperas, ke tiuj vizitintoj havos la okazon nin aŭdi, kaj mi certas, ke la aliaj aŭskultantoj fariĝos vizitontoj de La Chaux-de-Fonds.

A.- Kiuj alvenas en La Chaux-de-Fonds, ĉu aŭtomobile, ĉu fervoje, tiuj rimarkas ekde la ĉefavenuo de la urbo indikilojn, kiuj montras la direkton al Kultura Centro Esperantista, per la franclingvaj vortoj "Centre espérantiste" kaj la mallongigo en esperanto "KCE". Entute ekzistas 8 tiaj indikiloj.

Cl.- La trajnintoj, kiuj konsultas la planon de la trolebusaj haltejoj, konstatas, ke ili devas peti la haltejon "Esperanto" sur la linio franclingve nomata "succès", tio signifas "Sukceso".

A.- De la stacidoma ĉefhaltejo ĝis tiu nomata "Esperanto" oni trolebusas seson da minutoj alsuprante sufiĉe multe. Kiam oni eliras la trolebuson, oni troviĝas en arabareto kaj konstatas, ke la celita Kultura Centro Esperantista troviĝas en tipe montara regiono borde de la urbo. La trolebuso daŭrigas la alsupradon ĝis la posta haltejo, kiu estas la finstacio de la linio Sukceso. Oni tiam troviĝas piede de monto, kiu invitas al promenado, kaj vintre al skiado.

Cl.- Ni promenu kun tiuj alvenantoj la vojon, kiun indikas sinsekve du indikiloj. Unue oni laŭiras la arabareton, unue dudekon da metroj supren, poste kvindekon da metroj horizontale, kaj oni trovas la vojeton nomatan en la franca "Chemin des Postiers", "Strato de la Poŝtistoj". La dua kaj tria domoj estas tiuj de Kultura Centro Esperantista. Kelkaj ŝatas nomi ilin "svisaj ĉaledoj", pro la granda dekliveco de la tegmentoj kaj ĉar la fasadoj estas parte kovritaj de ligno je la supera etaĝo. Flavkoloraj, kun ruĝaj ŝutroj, ili aspektas multe pli grandaj sude, ol je la norda flanko, kie oni ĵus alvenas helpe de ŝtuparo komuna. Oni hezitas, ĉar ĉio estas ankoraŭ en konstruo, kaj tial mankas alvenaj indikiloj. Oni tuj komprenas, ke Kultura Centro Esperantista estas disvolviĝanta institucio.

A.- Kiuj revenas, post kelkmonata foresto, tiuj ĉiam miras pri la ŝanĝoj. Por doni ideon pri la disvolviĝo de la entrepreno, ni diru, ke la du koncernajn domojn Kultura Centro Esperantista akiris en 1978, kreinte por tio en 1976 la fondumon Gastejo Edmond Privat. En 1979 kreiĝis la necesaj ejoj por la administrado kaj la loĝigo de la gastoj. En 1980 konstruiĝis plurcela kunvenejo. Kaj ekde tiam, oni povis ekorganizi kurssesiojn sub la nomo Internacia FERIA Altlernejo. Sufiĉe kuraĝige progresis tiu aktiveco, kaj tial la gvidantoj de Gastejo Edmond Privat kaj de Kultura Centro Esperantista povis planadi la pluan disvolviĝon. En 1982 tria

domo estis aĉetita, kaj komence de tiu ĉi jaro 1983 kvar aliaj domoj estis akiritaj. Tio faras, ke la Centro posedas entute sep samgrandajn domojn, kiujn ĉirkaŭas sufiĉe vastaj ĝardenoj. Kaj tiun ĉi jaron oni laboris al la modernigo de tiuj ĉi domoj kaj de ties ĉirkaŭaĵo. Pro tio moderiĝis la kultura aktiveco.

Cl.- Sed vi eniru la domon No. 27 de la poŝtista vojo. Modesta esperanto-stelo konkukis vin tien, kaj ĉe la interna pordo de la teretaĝo indikilo atestas, ke vi alvenis ĝustaloke. Enirante vi troviĝas en vera libromagazeneto. Vin akceptos unu el la deĵorantoj de la Centro, mi mem dum la duono de la semajno, ĉar mi oficas duontempe kiel direktoro de tiu ĉi institucio, kaj la reston de la tempo venos al vi ĉu la esperanto-instruisto Stefano Keller, ĉu la kuiristo kaj purigisto Moussa Sy.

A.- Estos proponata al vi por la tranoktado lito ĉu en unulita, ĉu en dulita aŭ ĉu en kvarlita ĉambro. Ili troviĝas en la apuda domo, kaj baldaŭ ankaŭ ekzistos en la aliaj nun modernigataj domoj. Agrablan komforton ili proponas, kaj pro tio la gastoj ŝatas reveni.

Cl.- Post refreŝiĝo per duŝo kaj instaligi en via ĉambro, vi respondos jese al la invito sensoifiĝi en la salono. Kaj tie vi havos la agrablan senton troviĝi en kvazaŭ ĉaleda ĉambro, kies muroj estas per ligno kovritaj. Ĉio estas plurcele ekipita. La tabloj utilas por la manĝoj, sed ankaŭ por la kunvenoj kaj kursoj. Kuireja parto ebligas la pretigon de la manĝoj, bufedo la kuntrinkadon sub belaj globaj lampoj. Kamena angulo invitas al babilado antaŭ fajro. Volba pordo kondukas al ĝardeno teraso, kaj kun granda fenestro, alportas multe da lumo en tiun ĉi salanon, kiu estis konstruita fakte en la keletaĝo de la domo. En ĉiuj el la sep domoj du tiaj salonoj estas konstruitaj. Ĉiu havos precizan celon. Sed pri tio ni raportos en venonta elsendo.

A.- Unue vi konatiĝu kun la gastoj, kiuj babilas en la salono aŭ sur la teraso. Kelkaj diskutas, kaj tiucele utiligas la nigran tabulon por klarigi sian vidpunkton. Aliaj legas unu el la libroj de la memserva biblioteko, kiu okupas la fakojn de tuta muro. Kelkaj ludas aŭ sensoifiĝas.

Cl.- Ĉiuj sin prezentos diranta sian individuan nomon kaj alparolos vin, kaj vi konstatos, ke eĉ la esperanto-komencantoj evitas la krokodiladon. Ili venis por lerni esperanton aŭ lertiĝi en la praktiko de tiu ĉi lingvo, kaj tial la gvidvorto estas: ĉio nur pere de esperanto.

A.- Sed eble vi alvenis en momento, kiam kurso ne disvolviĝas. Tiam ĝenerale nur kelkajn gastojn vi renkontos: ĉu feriantoj, ĉu helpantoj. La unuaj pagas sian restadon per mono, la aliaj per manlaboro.

Cl.- Tiel sin prezentas Kultura Centro Esperantista kaj ties Gastejo Edmond Privat al la alvenantoj. La venontan semajnon ni vizitos tiun esperanto-kvartalon sepdoman, kiu tutcerte pli kaj pli allogos la esperantistojn el la tuta mondo, ĉar eĉ nun, en la pionira laborfazo, ili komencis alveni el ĉiuj kontinentoj. Tiun buntecon de la devenoj simbolas la nuna kuiristo, kiu estas bela nigrulo el Senegalio kaj la instruisto, kiu estas hungardevena. Nur mi mem estas indiĝena. Tio estas devigo al la konstanta utiligo de la internacia lingvo.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Raportis Claude kaj Andrée Gacond pri la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!